

Babilado kun Andy Künzli, la plej juna aktiva esperantisto de Svislando
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 459, 1981.03.05 & 07

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia Glaude Gacond kun Andy Künzli, juna esperantisto de Lucerno.

Sinjoro Andy Künzli, vi tutcerte estas la plej juna esperantisto de Svislando, kiu transprenis respondecon kaj ĝin ne nur regule, sed ankaŭ entuziasme kaj efike plenumas. Vi bonvolu priskribi al niaj geaŭdantoj la poresperantan laboron, kiun vi plenumas en via urbo Lucerno.

A.- Be mi unue volas koncize respondi al via interesa demando, mi devas resume diri, ke mi transprenis la oficon de la prizorgado de junularaj aferoj esperantistaj en nia urbo, en nia societo. Due mi redaktas nian societatan gazeteton LA LUCERNA PROGRESO, kiu aperas trifoje jare.

Esperantista agado jam ekzistas de ĉirkaŭ 50 jaroj en Lucerno, sed ĝi ne estis tre efika. Post la Universala Kongreso de Esperanto de 1979 ĝi vere plivigliĝis dank'al nia aparte tre efika varb-agado kaj dank'al la realigo de kursoj publikaj. La partoprenantoj al tiuj kursoj restas fidelaj al Esperanto ĝis hodiaŭ kaj regule partoprenas niajn societajn kunvenojn.

Pasintjare ni tute renovigis tiun esperantistan agadon en Lucerno. La loka grupo ricevis novan nomon - Lucerna Esperanto-Societo, kaj ni entreprenis ĉion eblan plibonigi la kvaliton de la grupa vivo. Ni plejparte atingis niajn celojn kaj iel povas fieri nun pri la farita laboro kaj la nuna agado.

Cl.- Tio pruvas, ke la Universala Kongreso alportis pozitivajn rezultojn almenaŭ en la urbo, kiu ĝin gastigis kaj grandparte organizis. Tio devus kuraĝigi la svisojn reinviti la UK-on. Kaj nun, s-ro Künzli, post tiu rapida prezento de la laboro, ni aŭdu kelkajn vortojn pri la laboranto. Vi estas gimnaziano, ĉu ne?

A.- Jes. Mi frekventas gimnazion en Lucerno kaj intencas poste studi ion, kio rilatas al lingvoj. Ekde mia infaneco la okupo pri lingvoj kaj pri fremdaj landoj ĉiam estis mia ĉefintereso, mia bastonĉevaleto, germanlingve dirite. Mi do sekve ankaŭ dezirus reteni tiun ĉi ĉevaleton, maturigi ĝin al ĉevalo vivoforta, per kiu mi plue povos rajdi tra la mondo en mia plenkreskula vivo.

C1.- Andy Künzli, povu tiu deziro efektiviĝi, des pli ke en via intereso prilingva, Esperanto okupas ĉeflokon. Mi fakte unuafoje renkontis vin tute hazarde en la biblioteko de la urbo Lucerno, kiam mi muntis tie ekspozicion pri EPSPERANTO EN SVISLANDO unu monaton antaŭ la Universala Kongreso en 1979. Vi estis kun via patrino kaj venis pruntepreni librojn. Vi jam sufiĉe bone regis la lingvon. Kiel vi fakte ekkonis Esperanton?

A.- Kam vi aranĝis tiun ekspozicion, mi ankoraŭ estis arde lernanta la lingvon - mi lernis ĝin mem cetere. Kiel hazarde ni ambaŭ renkontiĝis en la Centra Biblioteko de Lucerno, tiel ankaŭ hazarda estis mia konatiĝo kaj amikiĝo kun Esperanto. Dum la paskaj ferioj en 1979 mi ekskursis al Zuriko kun kuzo, kiu tie studis. Promenante tra la urbo ni hazarde renkontis junan viron, kiu disdonis flugfoliojn. Kaj estis nenio alia ol flugfolioj pri Esperanto. Mi entuziasme reagis al tiu agado kaj aĉetis diversajn broŝurojn kaj bultenojn al tiu junulo.

Hejme mi entuziasmege trafolumis unue, poste komencis serioze tralegi, fine vere trastudis tiujn eldonaĵojn. Kaj sen longe pripensi, mi mendis lernolibron ĉe la koncerna eldonejo kaj senĉese lernis kaj lernis, eĉ dum la instruado en la lernejo, dum enuigaj lecionoj.

Cl.- Vi faris kiel siatempe Edmond Privat kaj Hector Hodler, kiel raportas la libro Aventuroj de Pioniro. Ĉu vi tuj havis kontaktojn kun la esperantistoj en via urbo?

A.- Jes, kaj konsciante, ke la Universala Kongreso okazos en nia urbo, mi sentis la bezonon povi kiel eble plej bone paroli la lingvon. La kongreso alproksimiĝis kaj mi ricevis tiurilate sufiĉe respondecan taskon ĉe la gazetara servo. Fakte ŝajnas al mi, ke mi sufiĉe kontentige plenumis mian funkcion.

C1.- Vi havis la ŝancon povi tuj aktivii.

A.- Jes, kaj mi pli kaj pli aktiviiĝis. Mi aliĝis al esperanto-organizaĵoj mi vizitis kunvenojn, transprenis oficojn kaj tiel englitis en organizaĵon kiel oni kutime englitas tien. Pri tio scias ĉiu, kiu komencis aktivii en organizaĵo, egale kia. Ĉu ne!

Cl.- En tiu fazo de via vivo, vi jam gazetumis. Mi ricevis de vi specimenojn de lerneja revueto, kie vi raportis pri via ekintimiĝo kun la zamenhofa lingvo. Bona artikolo estis.

A.- Jes, fakte. Mi jam havis la okazon verki lernejan gazeton, kiam mi estis en alia gimnazio. Helpis min bona teamo, kiu okupiĝis pri diversaj temoj. Tiun gazeton ni eldonis kvarfoje jare, kaj ĝi aperis en multe pli granda amplekso ol LA LUCERNA PROGRESO pri kiu mi nun respondecas. En tiu lerneja gazeto mi kompreneble profitis la okazon publikigi artikolon pri Esperanto kaj interalie ankaŭ atentigis pri la kongreso okazonta en Lucerno.

Cl.- La redaktado de LA LUCERNA PROGRESO estas tutcerte nur parteto de via emo al ĵurnalismo, la videbla pinto de la glacimonto. Eble vi akceptos diri kelkajn vortojn pri viaj aliaj okupoj.

A.- Jes, volonte. Mi do fakte elektis Esperanton kiel unuan preferatan okupon post la lerneja aktiveco. Ĝi fariĝis mia kromprofesio, se oni komparas mian aktivecon de lernanto al profesia okupo.

C1.- Estas grave tamen bone atenti, ke tiu kromprofesio ne voru la tempon necesan al la plenumado de la profesiaj taskoj. Ne ĉiuj esperantistoj kapablas konservi tiun necesan ekvilibron.

A.- Jes, fakte. Alia ege ŝatata okupo estas por mi la kolektado de gazet-specimenoj. Dum la lastaj kelkaj jaroj mi kolektis preskaŭ dumil titolojn el 90 landoj. Mi interalie posedas la kompletan kolekton de la svisa gazetaro loka. Tiukaze mi volas ankaŭ mencii mian sufiĉe vastan korespondaĵon tre interesan, per kiu mi akiris specimenojn de gazetoj, kiujn mi tre verŝajne neniam estus ricevinta sen Esperanto.

Cl.- Vi do apartenas al la tipo de la kolektemuloj.

A.- Jes, kaj pli frue mi estis arda kolektanto de moneroj kaj bankbiletoj el la tuta mondo. De tempo al tempo mi konstruis modelojn de aviadiloj, ktp, ktp. Ĉion mi nature nun ne plu povas fari, kaj nuntempe mi preferas kolekti gazetojn.

Cl.- Tiu ĉi intereso por la gazetoj el la tuta mondo verŝajne spegulas vian intereson pri la lingvoj kaj pri la fremdaj landoj. Povas esti, ke ĝi orientos vian estontan aktivecon al ĵurnalismo. Tion ni scios, post kvino da jaroj, sed ĉar por via lernejo vi devas fari intervjuon, mi profitos post unu semajno doni al vi la eblecon min intervjui en la kadro mem de nia esperanto-programo de Svisa Radio Internacia.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond babilis kun Andy Künzli, la plej juna esperantisto de Svislando, kiu transprenis redaktoran respondecon, tio profite al la organo LA LUCERNA PROGRESO.

Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*